


**De la 31-a de Oktobro ĝis la 2-a de Novembro 2014, Bartošovice – kastelo**
**Od 31. októbra do 20. novembra 2014, Bartošovice – zámok**

## Informoj por la aliĝintoj

Elkoran dankon pro via aliĝo! Ni rekomendas al vi trovi iom da tempo por tralegi la ĉi-subajn informojn, por esti bone preparita al via senproblema alveno kaj ĉeesto en la kurso. Rimarko: bonvolu plusendi tiun ĉi mesaĝon al aliaj koncernuloj, se ili aliĝis per via retpoŝt-adreso, eventuale sciigu ilin pri ĝia enhavo.

## Informácie pre prihlásených

Srdečná vďaka za vašu prihlášku! Doporučujeme Vám nájsť si chvíľu času a přečítat si informácie, aby ste boli dobre pripravení na príchod a účasť na kurze. Poznámka: prepošlite prosím túto správu ostatným, ktorých sa to týka, ak sa prihlásili cez Vašu mailovú adresu, prípadne ich uvedomte o týchto informáciach.

## Gravaj informoj

**1. Pagoj:** Bonvolu kontroli ĉu vi sendis la aliĝilon kaj ĉu vi ricevis nian retpoŝtan respondon (kaj ĉu vi pagis la aliĝkotizon). Sen tio ni ne povas garantii rezervitajn tranoktojn, manĝojn kaj aldonajn servojn. Se vi ankoraŭ ne pagis la aliĝkotizon, faru tion tuj post via alveno al la kastelo, kune kun aliaj pagoj.

**2. Mono:** En Ĉeĥio validas la valuto „ĉeĥaj kronoj“, mallonge CZK. Por la aranĝo eblos pagi

surloke nur per kronoj (ni ne akceptas aliajn valutojn, monŝanĝejoj ekzistas en la urbocentro de Novy Jičín aŭ Studénka, ĉ. 12 aŭ 6 km for). Dum la aranĝo eblos aĉetadi, ekzemple en la bufedo, nur per la ĉeĥaj kronoj.

## Dôležité informácie

**1. Platby:** Prosím presvedč sa, či máš poslanú prihlášku a či si dostal mailom našu odpoveď (a zaplatil přihlasovací poplatok). Bez toho ti nemožeme zabezpečit ubytovanie, stravu a iné služby. Ak si ešte nezaplatil prihlasovací poplatok, urob to hneď po príchode, spolu s ostatnými platbami.
**2. Peniaze:** V Českej republike je platná mena „česká koruna“ skratka CZK. Poplatky je možné platiť na mieste len v CZK (nepríjimame inú menu, zmenárne sú v centre mesta Nový Jičín a Studénka, asi 12 alebo 6 km ďaleko). Počas podujatia bude teda možné kupovať, napr. v bufete, len za koruny.

## 3. La alveno kaj la foriro:

La aranĝo komenciĝos la 31-an de Oktobro posttagmeze (la alveno eblas ekde la 14-a horo) kaj finiĝos la 2-an de Novembro posttagmeze, je la 14-a horo. Kaze de la bezono eblas veni unu nokton pli frue, kaj eventuale resti kelkajn noktojn post la aranĝo, kontraŭ krompago. Se vi bezonas kromajn tranoktojn, nepre informu nin antaŭ la 15-a de oktobro 2014, por povi rezervi la lokojn, retpoŝte: verdastacio@gmail.com aŭ telefone 00420608003593.

## 3. Príchod a odchod:

Podujatie sa začína 31. októbra poobede (príchod je možný od 14-tej hodiny) a končí sa 2. novembra poobede o 14-tej hodine. V prípade potreby je možné prísť aj o jednu noc skôr, alebo zostať niekoľko dní po podujatí, za osobitný poplatok. Ak potrebujete ďalšie ubytovanie, čím skor nás o tom informujte, najneskôr do 15. októbra 2014, aby sme Vám zabezpečili miesto, mailom: verdastacio@gmail.com alebo telefonicky na č. 00420608003593.



***Adreso de la lernejo / Adresa školy:***
Zámek Bartošovice 74254 Bartošovice 1 Česká republika

En tiu ĉi konstruaĵo la partoprenantoj loĝos kaj manĝos. La instruado kaj la programo okazos parte en la bazlernejo, 150 m for de la kastelo.

V tejto budove budú účastníci ubytovaní a budú sa aj stravovať. Kurzy a program sa budú konať čiastočne v Základnej škole, vzdialej len 150 m od zámku.

## Kiel atingi la kastelon:

La kastelo situas en bela parko de la vilaĝo Bartoŝovice, nur 6 km de la flughaveno de Ostrava kaj 4 km de la fervoja nodo Studénka, 20 km de la urbo Ostrava kaj 12 km de la distrikta urbo Nový Jičín. Por vojaĝi al Bartošovice ni rekomendas uzi trafikajn informojn
http://jizdnirady.idnes.cz/vlakyautobusy/spojeni/

Vespere post la 21-a horo, se vi havos problemojn pri la trafiko el Studénka al Bartošovice (4 km), telefonu al 00420608003593, por ke ni prenu vin per aŭtomobilo. Busoj el Studénka al Bartošovice forveturas de la stacidomo de Studénka je 11:55, 13:23, 14:22, 16:02, 18:08, 19:10 kaj 21:00. Dum la paŭzoj en la kastelo estos je nia dispono kafejo.

### Ako sa dostať do zámku:

Zámok sa nachádza v krásnom parku obce Bartošovice, len 6 km od ostravského letiska a 4 km od železničného uzla Studénka, 20 km od mesta Ostrava a 12 km od okresného mesta Nový Jičín. Pre cestu do Bartošovíc Vám odporúčame pozrieť si informacie o doprave na stránke http://jizdnirady.idnes.cz/vlakyautobusy/spojeni/ .

Ak budete mať problém s dopravou večer po 21. hodine zo Studénky do Bartošovíc (4 km), volajte na číslo 608003593, aby sme Vás doviezli autom. Autobusy zo Studénky do Bartošovíc odchádzajú spred stanice Studénka o 1155, 13:23, 14:22, 16:02, 18:08, 19:10 a 21:00. V zámku bude počas prestávok k dispozícii kaviareň.

### 4. Instruado:

La instruado okazos en du/tri el la klasoj de la bazlernejo de Bartošovice, nur 150 metrojn de la kastelo. En la bazlernejo estos je nia dispono bufedo, dum ĉiuj paŭzoj.

### 4. Vyučovanie:

Vyučovanie sa uskutoční v dvoch/troch z učební na základnej škole v Bartošoviciach, len 150 metrov od zámku. V základnej škole bude k dispozícii bufet počas každej prestávky.

### 5. Manĝoj:

La manĝado okazos en la manĝejo de la kastelo (laŭ tempoj indikitaj en la program- tabelo). Ĉiuj, kiuj ne mendis manĝojn, devos mem prizorgi ilin. En la kastelo kaj la bazlernejo funkcios etaj bufedo/kafejo. Proksime de la kastelo troviĝas kelkaj restoracioj kaj picejo. Se vi volas mendi manĝojn, sed ne faris tion en via aliĝilo, bonvolu skribi al verdastacio@gmail.com

### 5. Strava:

Stravovať sa budete mocť v jedálni zámku (čas je uvedený v programe). Všetci, ktorí si neobjednali stravu, si ju musia zabezpečiť sami. V zámku a v škole bude k dispozícii malý bufet/ kaviareň. Neďaleko zámku je niekoľko reštaurácií a pizzeria. Ak si chcete doobjednať jedlo a neurobili ste to v prihláške, možete to urobiť hneď na verdastacio@gmail.com

### *6. Utilaj ligiloj rilate al la restado, vojaĝado kaj tranoktoj:*
### *6. Dôležité stránky ohľadne pobytu, cestovania a ubytovania:*

www.stacio.eu
www.wix.com/pably0/lernejo
www.wix.com/pably0/lernejocz
www.wix.com/pably0/lernejosk
http://jizdnirady.idnes.cz/vlakyautobusy/spojeni/
https://maps.google.cz/

## Programo

### 7. Instruado:

La instruado okazos en du grupoj laŭ la lingvonivelo laŭ la programo.
Komencantojn instruos sperta instruisto de Esperanto, sinjoro Stano Marček, aŭtoro de pluraj lernolibroj de Esperanto kaj iama manaĝero de la muzikgrupo TEAM, la plej fama muzika grupo en Ĉeĥoslovakio. Ĉiutage dum la lasta instruhoro okazos komuna kantado de Esperantaj kantoj kun gitaro.

Progresintojn instruos Magdalena Fejfičová. Ŝi instruis la lingvon en multaj lokoj en Slovakio, Germanio kaj Pollando. Ŝi instruis ankaŭ dum la lasta IEL en kastelo de Bartošovice.

## 7. Vyučovanie:

Vyučovať sa bude v dvoch skupinách podľa úrovne jazyka podľa programu.
Začiatočníkov bude vyučovaťskúsený učitel esperanta pán Stano Marček, autor učebníc esperanta a niekdajší manažer skupiny TEAM, najznámejšej hudobnej skupiny v Československu. Každý deň počas poslednej lekcie bude spoločný spev esperantských piesní s gitarou.
Pokročilých bude vyučovať Magdalena Fejfičová. Vyučovala jazyk na rozných miestách na Slovensku v Nemecku a Poľsku. Vyučovala takisto na poslednom IEL na zámku v Bartošoviciach.




## 8. Ekskursoj:

Por la ekskurso al la Malsanulejo de sovaĝaj bestoj de Natura rezervejo Poodří ni konsilas al vi preni sportajn ŝuojn.
Aŭtobusa ekskurzo al ĉirkaŭaĵo de la kastelo ne okazos pro ne sufiĉo da tempo, ĉar sabate posttagmeze vi povas partopreni la Fiŝkaptadan festivalon , kiu okazos sabate direkte en kastelo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Estos multaj butikoj, vizitandoj de tuta regiono kaj riĉa programo.



## 8. Výlety:

Na výlet do Nemocnice pre divú zver prírodnej rezervácie Poodří vám radime zobrať si športovú obuv.
Autobusový zájazd do okolia zámku sa neuskutoční kvoli nedostatku času, pretože v sobotu poobede sa môžete zúčastniť Rybolovného festivalu, ktorý sa uskutoční priamo na zámku a jeho okolí. Bude tu veľa obchodov, stánkov, návštevníkov z celého regionu a bohatý program.






## 9. Distra programo:





**La 31-a de Oktobro 2014 / vendredo**
**31. október 2014 / piatok**

Ĝis 19.00 la alveno kaj loĝigo en la kastelo Bartošovice. La loĝigo eblos ĝis la 22-a horo, pli malfruan alvenon oni devas interkonsenti kun la estraro de la lernejo.
19.00 – Vespermanĝo en la manĝejo de la kastelo.
20.00 – Solena malfermo kun distra programo. Interkonatiĝo.

Do 19.00 hod. príchod a ubytovanie – zámok Bartošovice . Ubytovanie je možné do 22. hod., neskorší príchod dohodnúť s veducím školy.
19.00 – večera v jedálni zámku
20.00 – Slávnostné zahájenie a zoznamovací zábavný večer







**La 1-a de Novembro 2014 / sabato**
**1. november 2014 / sobota**

7.00- Matenmanĝo
8.00- 12.00 – Kurso de Esperanto
13.00 – Tagmaĝo
13.00 – ĝis mateno – Fiŝkaptada festivalo
14 aŭ 15 aŭ 16 horo – ebleco viziti la Malsanulejo de sovaĝaj bestoj
18.00 – Vespermanĝo
19.00 – NOPROBLEM – publika koncerto de la muzikgrupo
koncerto parte en Esperanto kaj en ĉeĥa lingvo

- Amuza vespero
- kantado en Esperanto kun Stano






7.00 - Raňajky
8.00 - 12.00 – Kurz esperanta
13.00 – Tagmaĝo
13.00 – do rána – Rybárske slávnosti
14 alebo 15 alebo 16 hod. - možnosť navštíviť Nemocnicu divej zveri
18.00 – Večera
19.00 – NOPROBLEM – verejný koncert hudobnej skupiny
koncert z časti v esperante a v českom jazyku

- Zábavný večer
- Spievanie v esperante so Stanom

**La 2-a de Novembro 2014 / dimanĉo**
**2. november 2014 / nedeľa**

8.00- Matenmanĝo
9.00- 13.30 – Kurso de Esperanto
13.30 – Tagmaĝo
14.00 – 21.00 – forveturo de la partoprenantoj.

8.00- Raňajky
9.00- 13.30 – Kurz esperanta
13.30 – Obed
14.00 – 21.00 – odchod účastníkov

## Kontaktoj:

www.wix.com/pably0/lernejo
Ĝenerale ni petas kontakti nin rete, sed kaze de urĝa bezono dum via vojaĝo, vi ankaŭ povas kontakti la organizantojn telefone: Paŭlo +420 608003593 Se vi havas ajnajn demandojn aŭ komentojn, bv. skribi al verdastacio@gmail.com

Ĝis la revido dum la aranĝo en la kastelo!

## Kontakty:

www.wix.com/pably0/lernejo
Prosíme kontaktujte nás v prípade potreby počas cesty: Organizátori: Paŭlo +420 608003593 Ak máte nejasnost alebo otázku, prosím kontaktujte nás cez mail: verdastacio@gmail.com

Dovidenia na podujatí v zámku!

## Sponzori
## Subtenantoj

**FORD – Nový Jičín**

**Obecní úřad Bartošovice**

**Informační centrum město Nový Jičín**

**Základní škola Bartošovice**